N. N. 92,

Alfluginta birdeo

tradukita de Ferdinand Pfeil

Alfluginta birdeto
sin sidigis ĉe mi;
amatinan saluton
en la bek' portis ĝi.

Ne en hejm', knabineto,
en fremdland' estas mi;
ne min amas kateto
nek hundet' tie ĉi.

Ŝi promesis feliĉon
por la tempo de l' flor';
la somero jam venis -
l'amatin' estis for.

Kara birdo, reflugu
kun salut' kaj kiset'!
Ke mi povu nun flugi -
vana amdeziret'.

Traduko de la Germana poemo "Kommt ein Vogel geflogen" de N. N. 92 en Esperanton de Ferdinand Pfeil.

Arg-1033-2096 (2014-05-31 10:33:23)

Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt u. Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann.